

Rakoen Maertens parolis nome de UEA en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO



Funkciulo de UN avertis
pri terura malsato en
Jemeno

NATO aldonos soldatojn
al Afganio

Alta germana kortumo
volas oficialigi la trian
seksanecon

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Rakoen MAERTENS parolis nome de UEA en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO

Fruktodona dialogo surbaze de malfermeco kaj komprenemo p. 03

Funkciulo de UN avertis pri terura malsato en Jemeno

Aera, mara kaj tera blokado p. 04

NATO aldonos soldatojn al Afganio

La organizo pliigos la nombron de soldatoj en Afganio de 13 000 ĝis 16 000 p. 05

Alta germana kortumo volas oficialigi la trian seksanecon

La unua eŭropa lando enhavanta laŭleĝe tia tria seksaneco p. 05

Natria bikarbonato

Forta alkalo p. 06

Ennio MORRICONE

Itala (roma) komponisto, muzikisto kaj orkestra dirigente p. 07

Okaze de la Internacia Tago por Toleremo

16 novembro 2017 p. 08

Hodiaŭe

Alfred Hermann FRIED; Carlos FUENTES; Fjodor

DOSTOJEVSKIJ; kaj Hans Magnus ENZENSBERGER p. 09

Rakoen MAERTENS parolis nome de UEA en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO

UNESKO-funkciulo: Mi donas la parolon al s-ro Rakoen Maertens, reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio.

Rakoen

[MAERTENS]: viaj prezidantaj moŝtoj de la Ĝenerala Konferenco, via Ĝenerala

Sekretaria moŝto, viaj delegitaj moŝtoj. Gesinjoroj!

Komunikado! Jen kial ni ĉiuj estas ĉi tie. Ni estas ĉi tie por trovi komunajn interesojn. Ni estas ĉi tie por kreskigi interkomprenon inter ni ĉiuj. Ni ĉiuj volas estigi partnerecojn ĉirkaŭ niaj valoroj, niaj kredoj kaj niaj komunaj vidpunktoj.


Tamen, komunikado ne ĉiam estas tio, kion ĝi ŝajnas esti: ekzistas baroj. Unu el tiuj baroj povas esti lingvo. Diferencoj en lingvonivelo kaj lingvaj spertoj depende de kie ni naskiĝis.

La interpretado de simboloj kaj gestoj ligitaj al specifa kulturo, malegaleco de

memesprimado, ĉar kelkaj lingvoj ne estas vaste agnoskataj, dum aliaj estas. Uzado de specifa lingvo ligita al specifa kulturo kreas komunikan antaŭjuĝon.

Universala Esperanto-Asocio klopodas reagi je tiuj problemoj. Kune kun pli ol 100 landaj Esperanto-asocioj kaj pli ol 60 alligitaj fakaj asocioj, nia asocio

pledas por profunda multifaceta komunikado, egaleco inter lingvoj kaj kulturoj, lingva diverseco kaj kulturaj interŝanĝoj.



Fondita en 1908, nia asocio havas longan historion pri pledado por tiuj valoroj. Jam de pli ol 60 jaroj nia asocio estas en konsultaj rilatoj kun UN kaj UNESKO. Dum Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Montevideo, en 1954, kaj en Sofio, en 1985, niaj laboroj kaj atingoj estis oficiale agnoskitaj kiel antaŭenigaj por por interkompreno inter la popoloj de la mondo.

La deirpunkto de la internacia lingvo Esperanto estas la bezono de pli bona komunikado per komuna egaleca lingvo, facile lernebla kaj sen ligo al ajna politika potenco.

Ĉi jare, ni kune kun UNESKO memorsolenas humaniston kiu kreis

Esperanton, Ludoviko Zamenhof kiu forpasis antaŭ cent jaroj . Ni sincere dankas UNESKOn kaj la Polan delegitaron pro ilia helpo en realigo de tiu ĉi celebrado, kaj ĝojas invitin vin ĉiujn al nia evento la 11-an de decembro en tiu ĉi konstruaĵo.

Kun ĝojo ni ankaŭ anoncas, ke ekde tiu ĉi jaro la ĵus relanĉita UNESKO-kuriero havas Eesperantan version.

Komunikado. Mi komencis mian parolon emfazante la gravecon de bona komunikado. Por fini, mi deziras al vi profundan, signifoplenan kaj fruktodonan dialogon surbaze de malfermeco kaj komprenemo. Dankon!

(Parolo farita matene de la sesa de novembro 2017 en la Ĝenerala Konferenco de UNESKO.)

El Popola Ĉinio

Funkciulo de UN avertis pri terura malsato en Jemeno

Mark Lowcock, ĝeneral-vicsekretario de la Unuiĝintaj Nacioj pri humanitaraj aferoj, avertis merkrede [08 nov 2017], ke Jemeno alfrontos

teruran malsaton, se ĝi ne nuligos aeran, maran kaj teran blokadon enkondukitan de la koalicio gvidata de Saud-Arabio.

Lowcock konigis la situacion en Jemeno

tiutage en nepublika kunveno de la Sekureca Konsilio. Poste en gazetara konferenco, li diris, ke se la koalicio gvidata de Saud-Arabio ne nuligos la blokadon kontraŭ Jemeno, kelkaj

milionoj da homoj en la lando alfrontos teruran malsaton, eĉ pli gravan ol tiu ĉi-jare ol Sud-Sudano kaj tiu en Somalio en 2011, tial la

aeraj, maraj kaj teraj vojoj de la lando devas esti malfermitaj al la humanitara agado de la UN.

Yu

Ĉina Radio Internacia



NATO aldonos soldatojn al Afganio

Ĝenerala Sekretario de la Nord-Atlantika Traktat-Organizo Jens STOLTENBERG diris ĵaŭde [09 nov 2017], ke la organizo pliigos la nombron de soldatoj en Afganio de 13 000 ĝis 16 000.



Ministroj pri defendo de la membroj de la Nord-Atlantika Traktat-Organizo kunvenis tiutage kun reprezentantoj de landoj partoprenantaj en la tasko de

subteno al Afganio. STOLTENBERG diris poste en gazetara konferenco, ke la afganiaj trupoj estas iom fortigitaj en la batalo kontraŭ la grupo Talibano, tamen la sekureca situacio restas defia. Li aldonis, ke la organizo subtenos plu la pacan kaj reakordigan procezon de Afganio kaj helpos al ĝi fortigi la sekurigan kapablon kaj trejni novajn militajn gvidantojn.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Alta germana kortumo volas oficialigi la trian seksanecon

Ekde maio 2013 en Germanlando, okaze de registro pri naskiĝo, oni povas preterlasi la indikon pri sekso. Nun plia novigo ekestas: tie iu homo, naskiĝinta kaj registrita kiel ino en 1989, apelaciis al Konstitucia Tribulano cele al agnosko pri ŝia seksaneco kiel nek viro nek virino, sed tria sekso. Tiu apelacianta homo prezentis al tribunalo kromosoman analizon montrante, ke ŝi estas nek viro nek virino. Pasintjare iu malalta juĝinstanco rifuzis tion asertante, ke “la afero estus neleĝa”.



Konstitucia Tribunalo decidis, ke la Parlamentoĉambro voĉdonu – antaŭfine de 2018 – iun projekton pri seksaneco, cele al aldono de la elektorajto “tria” flanke de la ebloj “ina” kaj “vira” ĉe la naskiĝatestilo.

Kun sidejo en la urbo Karlsruhe, la tribunalo argumentas, ke la nuna leĝo estas diskriminacia, ĉar la ĝenerala rajto al personeco inkluzivas ankaŭ la “seksan identecon”, kies ĝusta klasigo gravas.

La oboe de la parlamentanoj al tiu verdikto fare de la konstituciaj juĝistoj estigus la unuan eŭropan landon enhavantan laŭleĝe tian trian seksanecon.

Nu, lastmerkrede, la 8-an de novembro,

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

Natria bikarbonato

Natria bikarbonato forigas 96% da pesticidoj el fruktoj kaj legomoj.

Dum jarcentoj apartenas natria bikarbonato al niaj helpantoj en mastrumado. Eblas uzi ĝin por purigado, lavado, desinfektado kaj por kuracado. Laŭ novaj esploroj ankaŭ por tio, kion scipovas neniu „moderna“ preparaĵo. El legomoj kaj fruktoj kulturitaj laŭ kutima metodo ĝi kapablas forigi 96% de pesticidoj dum dekkvin minutoj. Sufiĉas meti terfruktojn en la solvaĵon de natria bikarbonato dum dekkvin minutoj!

Natria bikarbonato estas forta alkalo, do ĝi havas alkalecan pH kaj ĝi kaŭzas rapidan katalizon de pesticidoj. Ĝuste ili rilatas al la tuta rango de misfunkcioj kaj malsanoj, ek de sterileco, hormona malsekvilibro ĝis kancero.

Restoj de pesticidoj povas resti sur la terkultura produktaĵo kaj kontribuas al la akceptado de pesticidoj per nutraĵo de sanriskoj akceptante pesticidojn en la nutraĵo daŭre kreskas en la lastaj jaroj, do konvenas limigi ilian konsumadon.

El eksperimentoj rezultas, ke natria bikarbonato kapablas forigi ankaŭ restojn de pesticidoj forte ligitaj al la ŝelo de fruktoj.

Ne nur desinfekto

La natria bikarbonato akiras pli kaj pli da favorantoj. Kaj tiu blanka miraklo taŭgas ankaŭ por flegado de haŭto. Kiel uzi ĝin?

Purigado de vizaĝo

Vi mem povas produkti purigpaston de 3 partoj de natria bikarbonato kaj 1 parto de akvo. Kun tiu pasto oni delikate frotmasaĝas la haŭton per rondira movado. Poste tralavu per varma akvo. (Tiu pasto estas tiel



delikata, ke eblas uzi ĝin ĉiutage.) Delikate vi senigas vin de mortintaj ĉeloj, malmultekoste kaj rapide.

Flego post raso

Razado kun razklingo incitas la haŭton, rezultigas la papulojn. Se ankaŭ vi havas malbonajn spertojn forigante korpharojn, vi povus kvietigi la haŭton per solvaĵo kiu konsistas de unu taso da akvo kaj unu kulero da natria bikarbonato. Lasu ĝin sekigi (ĉirkaŭ 5 minutojn) kaj poste tralavu per malvarma akvo.

Dentoblankigilo

Por blankigi la dentojn sen ĥemiaĵoj sufiĉas superŝuti ĝin sur la humidan broseton kaj purigi la dentaron per kutima maniero. Sed vi ne devus uzi la natrian bikarbonaton kiel anstataŭon de dentopasto.

Jarka MALÁ
Esperanta Retradio

Ennio MORRICONE *Se Telefonante*

La 10-an de novembro estas la datreveno de la naskiĝo (en 1928) de la itala (roma) komponisto, muzikisto kaj orkestra dirigento Ennio MORRICONE aŭtoro, interalie, de muzikoj de pli ol 500 filmoj kaj televidaj serioj, aparte por la filmoj de la ĝenro “vakera laŭ la itala maniero”, sed ankaŭ por alispecaj filmoj, kiuj akiris prestiĝajn premiojn.



En 2016, estis al li atribuita la Oskar-premio pro la plej bona sonstrio (por la filmo de Quentin TARANTINO “*The Hateful Eight*”).

MORRICONE vendis pli ol 70 milionojn da diskoj. Al li estis dediĉita asteroido, 152188 *Morricone*.

En Esperanto ekzistas la versio (de Giuseppe CASTELLI) de unu lia kanzono “*Se telefonando*” – *Se telefonante*, siatempe (1966) lanĉita de Mina MAZZINI.

Vortoj de Ghigo DE CHIARA kaj Maurizio COSTANZO

Muziko de Ennio MORRICONE

Trad. Giuseppe CASTELLI

*La mirigo de la
nokto
malfermita sur
mar’
kaptis nin dum
ni ankoraŭ
estis fremdaj al
ni.
Tra l’ mallumo
viaj manoj
miajn manojn
prenis, kaj
eble iom tro*

*rapide
en ni kreskis la am’.*

*Se telefonante
mi vin kapablus adiaŭi,
mi telefonus;
se vin renkontante
mi certus vin ne suferigi,
mi vin renkontus.*

*Se rigardi vin sufiĉus
por diri ke sufiĉas, mi tion farus...
Kiel mi klarigu
pri nia am’ ĵus naskiĝinta
kaj jam finita?*

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo

Okaze de la Internacia Tago por Toleremo, 16 novembro 2017

“Je la tago de ĝia kvindeka datreveno, la 16-an de novembro 1995, la membraj ŝtatoj de Unesko akceptis Deklaron de Principoj pri Toleremo.

Interalie, la Deklaracio

asertas, ke toleremo estas nek indulgo nek indiferento. Ĝi

estas respekto kaj apreco de la riĉa diverseco de la kulturoj de nia mondo, niaj

formoj de esprimo, kaj niaj manieroj homi. Toleremo rekonas la universalajn homajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn de aliaj personoj. Homoj nature diversas; nur tolero povas garantii la pluvivon de miksitaj komunumoj en ĉiu regiono de la terglobo.

“La Deklaracio priskribas toleremon ne nur kiel moralan devon, sed ankaŭ kiel politikan kaj juran devigon por unuopuloj, grupoj kaj Ŝtatoj. Ĝi metas toleremon en rilaton al la internaciaj homrajtaj instrumentoj formulitaj tra la pasintaj kvindek jaroj, kaj emfazas, ke la Ŝtatoj elformulu novajn leĝojn kie tio necesas, por sekurigi egalecon de

pritrakto kaj vivoŝanco por ĉiuj grupoj kaj unuopuloj en la socio.

“Rektaj maljusteco kaj perforto estas oftaj formoj de maltoleremo, sed same

ankaŭ

diskriminacio

kaj

flankenŝovado.

Edukado por

toleremo celu

rebatu influojn

kiuj kondukas

al la timo de

aliuloj kaj ilia

ekskludo, kaj

helpu la

gejunulojn

formi kapablojn

de sendependa

juĝkapablo,

kritika pensado

kaj etika

rezonado. La

diverseco de la

multaj religioj,

lingvoj, kulturoj kaj etnoj ne estas preteksto por konflikto, sed trezoro kiu riĉigas nin ĉiujn.”

Tion deklaras la retejo de Unuiĝintaj Nacioj koncerne toleremon kaj la Internacia Tago por Toleremo, kiun oni festas la 16-an de novembro. Kiel vi praktikas toleremon en via agado por Esperanto? Kiel vi esprimas ĝin en via ĉiutaga vivo?

Ni invitas vin, okaze de la Internacia Tago por Toleremo, dediĉi vin al persona kaj kolektiva toleremo en la spirito de nia lingvo Esperanto!

Esperanto por UN





Alfred Hermann FRIED


Alfred Hermann FRIED (naskiĝis la 11-an de novembro 1864 en Vieno, mortis la 5-an de majo 1921 en Vieno) estis aŭstra pacemulo kaj verkisto. Li ricevis la Nobelpremion pri paco kun Tobias ASSER en 1911.

FRIED parolis Esperanton, kiun li eklernis en 1900. Li kunlaboris en la Esperanto-revuo *L'Espérantiste* kaj, en 1903, li verkis lernolibron. Krome, li partoprenis Universalajn Kongresojn kaj verkis vortaron.

Vikipedio

Carlos FUENTES

Carlos FUENTES Macías (naskiĝis la 11-an de novembro 1928 en Panamo mortis la 15-an de majo 2012) estis unu el la meksikaj verkistoj de la fino de la 20a jarcento plej konataj, aŭtoro de romanoj kaj eseoj.



Vikipedio



Fjodor DOSTOJEVSKIJ

Fjodor Miĥajloviĉ DOSTOJEVSKIJ (ruse Фёдор Миха́йлович Достоевский; naskiĝis la 11-an de novembro 1821 en Moskvo; mortis la 9-an de februaro 1881 en Sankt-Peterburgo) estis rusa verkisto, konsiderata de multaj kiel unu el la plej grandaj romanverkistoj en la historio pro profunda psikologio de la figuroj.


En Esperanto aperis pluraj tradukoj.

Vikipedio

Hans Magnus ENZENSBERGER

La germana verkisto, ĵurnalisto, tradukisto kaj eldonisto Hans Magnus ENZENSBERGER - en Esperantujo konata kiel Hans' Magno Encensbergo - naskiĝis je la 11-a de novembro 1929 en *Kaufbeuren*, Bavario.

En Esperanto aperis: *Poemoj*.



Vikipedio